

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

30-a Jarkolekto * Marto 2016 * N-ro 100

ISSN 1576-0618



numero

100

*Je la servo de la disvastigo de
Esperanto en Andaluzio kaj de
Andaluzio en la tuta mondo*

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL, Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

Ĉefartikolo	3
Esperanto en Andaluzio	5
José Garzón Ruiz: un ilustre ilustrado.....	12
18-a Andaluzia Kongreso de Esperanto.....	17
19-a Andaluzia Kongreso de Esperanto	21
Lingva Angulo	27
Turismi en Villanueva de Córdoba	29
Paĝoj pri nia historio	32
Flamenko	36
Andaluzia Kuirarto	38
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio	39
Humuro	41

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ĈEFARTIKOLO

Sciate, ke longa vojo komenciĝas per ununura paŝo, tamen, kio okazas kiam ni troviĝas antaŭ gravega ŝtupo? Tio mem okazis al nia revuo ekde antaŭ du jaroj. Ni devis alfronti la aperon de la numero 100-a de *Gazeto Andaluza* kaj pro tio, ni pensis unuamomente eldoni enhavoriĉan, luksan aŭ specialan numeron. Do, ni prokrastigis la aferon eldoni tiun centan numeron.

Tamen, ĉio devas esti pli simpla. La numero 100-a de nia revuo, kiun vi havas nur enmane, fine ne volas esti io speciala, nur plia numero. Tiel ni certigas la daŭrigon de nia eldonaĵo, ĉar ni ne rajtas prokrastigi plue la aperon de nia andaluza esperantista revuo.

Kompreneble, pro la paso de la tempo, multaj aferoj okazis en la esperantista movado en Andaluzio. Krome, ni vivas specialajn momentojn, ĉar ĵusaj ideoj ekaperis, novaj vizaĝoj alvenis en la movadon kaj kelkaj renkontiĝoj, kie la lingvo esperanto vivis, okazis en Andaluzio dum ĉi tiuj du lastaj jaroj.

Pri ĉi ĉio ni volas paroli en la centa numero de nia revuo. Kompreneble, iamaniere ja devas esti speciala ĉi numero, tiel, JOSE RUIZ, nepo de la fondinto de nia revuo (S-ro José Garzón Ruiz) sendis al ni saluton, vi eble jam konas la strofojn de la zamenhofa poezio... *viaj nepoj vin benos*. Multajn dankojn Pastro José María, kaj ni esperas, ke dum multaj jaroj vi estos nia leganto, interŝanĝe ni promesas honorigi la memoron de via pra-familiano per la ofta publikigado de ĉi tiu revuo, lia elpensajo.

Ĉar multaj aliaj aferoj okazis ĉe la movado en nia lando dum ĉi tiuj du lastaj jaroj, ni decidis ordigi ilin laŭ provincoj, por sciigi kiel fartas esperanto ĉe ĉiu andaluza provinco, ne forgesante la okazigon de

du gravaj, eĉ gravegaj, renkontiĝoj en Andaluzio. Pri unu el ili, la 74-a Hispana kaj 17-a Andaluza Kongreso de Esperanto en Arundo en majo 2014, ni informas pere de fotografiaĵoj, ĉar jam la tempo pasis kaj verŝajne ne temas pri aktuala novaĵo. Krome, estas troveblaj pliaj informoj pri tiu Kongreso, pli akurataj, sur multaj aliaj revuoj kaj eĉ en la reto. Alia grava okazintaĵo estis la 19-a Andaluza Kongreso de Esperanto de la jaro 2015 en Jerezo, pri tiu renkontiĝo ni amplekse parolas sur ĉi tiu revuo.

Kaj kompreneble, ni ne forgesas la konstantajn rubrikojn kaj sekciojn de nia revuo: Gastronomio, Misteroj kaj Legendoj, Historio de Esperanto, Turismo, ktp. Ni esperas, ke ĉi ĉiuj branĉoj plaĉos al vi.

Do, ni jam finas ĉi tiujn unuajn vortojn. Ni denove pardonpetas pro la granda prokrasto rilate la eldonon de nia revuo, kiu kompreneble, daŭras tute via kaj aktuala kaj samtempe ni promesas aperigi ĝin ekde nun akurate trimonate.

Ni saltis specialan ŝtupon, cent numeroj en revuo estas io grava. Ĉi tiu revuo, kiu naskiĝis en la jaro 1984 kiel revo de grupeto de adoleskuloj, volas maturiĝi kaj per tio kunlabori en la disvastigo de Esperanto en Andaluzio kaj en la diskonigo de la Andaluza Kulturo en la tuta mondo pere de nia internacia lingvo. Jen nia tasko.

Kordovo, aŭgusto 2016. *La redaktoro*





ESPERANTO EN ANDALUZIO



SEVILO

Sendube Sevilo estas la andaluzia provinco kie la esperanto-movado pli vigliĝis dum la pasintaj du jaroj. Refondiĝis tie la movado, aperis novaj vizaĝoj, komenciĝis novaj projektoj kaj kreskis la nombro da geesperantistoj, kiuj nuntempe ni povas kalkuli tie kun 50 homoj. Jen kelkaj informoj pri Sevilo kaj Esperanto okazintaj ekde 2014:

★ En la monato oktobro 2014, la sevilja ĵurnalo *EL CORREO DE ANDALUCÍA* informis pri la kurso organizata de Rafael Mateos en la Publika Biblioteko “Infanta Elena”. La artikolo kaj apuda intervjuo montris favoran opinion rilate la internacian lingvon kaj sur ĝi aperis ankaŭ Francisco Rodríguez, tiam unu el la lernantoj de pasinta kurso.

CULTURA

«Los países que dominan son los que imponen su propio idioma»

El profesor de esperanto Rafael Mateos inaugura hoy en la Biblioteca Pública Infanta Elena un curso gratuito de iniciación a esta singular lengua.

ISMAEL G. CABRAL / EL 06 OCT 2014 / 12:45 H.



El profesor Rafael Mateos, fotografiado junto a su alumno de esperanto más aventajado, Francisco Rodríguez. / J. M. Paisano

★ Restis en Sevilo dum kelkaj monatoj komence de 2015 franca Daniel Maynaud, kune kun sia edzino. La celo de la restado estis labori kiel esploristo en la Kemia Fakultato. Daniel estas aktiva esperantisto, instruisto de la internacia lingvo, kaj fakulo pri kvantuma fiziko en la Universitato de Tuluzo.

★ Okazis la 10an de aprilo 2015 Renkontiĝo kaj Ekspozicio de Alternativaj Asocioj kaj grupoj en la Parko San Jerónimo en Sevilo. Stariĝis pli ol 70 budoj, kaj inter ili tiu de la Grupo Esperantista de la urbo, kie oni montris librojn, propagandilojn kaj oni oferis informon pri la internacia lingvoj al ĉiuj interesitoj. Ĉe tiu sama loko okazis ankaŭ prelego de Juan de Dios Montoto pri la temo “Esperanto, cent jaroj en Sevilo”, dum ĝi oni sciigis pri la demarŝoj cele la publikigon de samtema libro.



★ Okazis en la urbo Sendai en oktobro 2015, la 102-a Japana Esperanto-Kongreso. Sendai estis la elir-punkto de la ekspedicio de la japana samurajo Hasekura Tunenaga, kiu celis al Romo antaŭ 400 jaroj, kvankam la fina punkto de sia vojaĝo, kaj tiu de liaj multaj kunuloj, estis la vilaĝo Coria del Rio, tuj apud Sevilo. La organizantoj de la japana kongreso petis specialan saluton de la sevilja samideanaro, por esti legita

dum la esperanto-renkontiĝo. La sevilaj geesperantistoj ne redaktis saluton, male filmis ĝin, tiel renkontiĝis kelkaj gesamideanoj ĉe parko de Coria del Rio kie stariĝas monumento al Hasekura Tunenaga kaj filmis belegan saluton, montrita dum la japana kongreso.

La filmo ankoraŭ oni povas vide ĉe jutubo en la adreso:

<https://www.youtube.com/watch?v=SdOHUEgu6Mk>



★ La Zamenhofa Tago de la jaro 2015 organizata en Sevilo estis ege speciala. Ĝi finiĝis per komuna bankedo, kiel kutime, kie renkontiĝis ne nur sevilaj geesperantistoj sed ankaŭ de aliaj provincoj. Tamen, tio speciala estis komuna ekskurso de la esperantistaro tra la tegmentoj kaj terasoj de la sevila katedralo. Jes, ĉiuj turistoj en Sevilo vizitas la katedralon, tamen la esperantistaro ĉi-jare vizitis la

tegmentojn de la katedralo, tuj apude al la mondfama Giraldo. Iamaniere ni ĉiuj sentis nin kiel Kvazimodon, ĉu ne?



★ La pasintan 25an de majo okazis ĉe la Oficiala Korporacio de Kuracistoj de Sevilo prelego pri la temo “Esperanto, algo más que una lengua” (Esperanto, io pli ol lingvo), fare de nia sevila samideano José Roldán León. Jose Roldan, krom Prezidanto de Sevila Esperantista Asocio, estas ĉefkuracisto en la Servo de Taksado de Nekaplabeco en Sevilo.

★ “Aula de Esperanto 2” estas la nomo de blogo elpensita de universitata profesorino en Sevilo kiu multe simpatias kun nia lingvo kaj eĉ eklernas ĝin. La oftaj kunlaborantoj en tiu blogo estas Guillermo Molleda, ankaŭ universitata profesoro en Sevilo, kaj José María Rodríguez, ambaŭ kordovaj esperantistoj. Vizitu ĉi tiun novan blogon en la jena ret-adreso: <http://auladeesperanto2.blogspot.com.es/>

★ BABELO FILMOJ, jutuba kanalo, estas elkreaĵo de Pablo Busto kaj Fran Lobato. Sur ĝi estas eble trovi infan-kantaĵojn realigitajn de Pablo kaj kun enscenigo de Fran. La fina rezulto estas alt-kvalita kaj per tiuj produktaĵoj estas eble koni Ulison kaj lian familion. Simpatiaj gantpupoj kiuj kantas en esperanto infan-kantaĵojn. Mond-fama jam estas la produktaĵo “Dek Bovinoj”, pere de kiu Uliso instruas la

nombrojn en esperanto, ĝi jam ricevis pli ol 3000 vizitojn tra la tuta mondo. Ni invitas vin vidi kaj komenti tiujn videojn ĉe la jutuba kanalo “Babelo Filmoj”. Gratulon Pablo kaj Fran.



★ La pasintan monanton decembro Sevila Esperanto-Asocio ricevis malavaran donacon de libroj kaj revuoj en esperanto, fare de la familio de S-ro José María Arias de Reyna Ferrero (1915-1994). Li reorganizis la esperanto-movadon en Sevilo post la civila milito kaj li estis membro de la Hispana Esperanto-Federacio kaj delegito de Universala Esperanto-Asocio en la urbo dum la 50-a jardeko. Sevila Esperanto-Asocio kaj la tuta andaluzia E-movado dankas ĉi tiun sindoneman donacon.

KORDOVO

★ Ene de la projekto “Esperanto kaj Universitato” la kordovaj samideanoj José María Rodríguez kaj Guillermo Molleda prezentis ĉe la Universitato de Kordovo oficialan peton por oficialigi la diplomon

pri kono de la internacia lingvo esperanto. Sciate, ke ekde antaŭ kelkaj jaroj estas necese atingi diplomon pri kono de alia lingvo, ne hispana, por fini ĉiujn universitatajn studojn. Ĝis nun, inter tiuj lingvoj akceptitaj ne troviĝas esperanto, do, la celo de tiu projekto estas oficialigi la diplomon pri kono de esperanto.

Okaze de la prezento de la peto la kordovaj samideanoj renkontiĝis kun la prestiĝa profesorino pri hispana lingvo María Dolores Calero Vaquera, kiu estas tute favora al nia lingvo kaj eĉ verkis pri la temo interlingvistiko. Do, temas pri la unua kontakto kun unu el la plej famaj profesorinoj de la kordova universitato kaj la E-movado en Kordovo. Espereble, tiu kontakto ripetiĝos en venontaj kursoj.

MALAGO

★ La ĵurnalo “La Opinión de Málaga” informis pri la kurso organizita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en la lernejo Al-Andalus. La ĵurnalisto intervjuis al Carlos Spinola, kiel profesoro, al Angel Arquillos, kiel prezidanto de la Asocio kaj al unu el la lernantinoj. La etoso de la informo estis tute favora al nia lingvo.



★ La urbo “Málaga” jam aperas en la Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio, dank’al la nomumo de du delegitoj en la urbo. Ili estas Ángel Arquillos López, delegito de UEA kaj fakdelegito pri Literaturo kaj Carlos Spinola, vicdelegito. Ankaŭ jam ekzistas delegito en la urbo “Ronda” en la provinco Malago, temas pri Fátima Jiménez,

delegito de UEA en tiu urbo kaj fakdelegito pri feminismo, programado: libera softvaro kaj sociala justeco. Espereble la nombro da delegitoj de Universala Esperanto-Asocio pligrandiĝos en venontaj jaroj kaj tiel aperos kiel eble plej nombraj andaluziaj urboj en la Jarlibro kiu UEA eldonas ekde la jaro 1908.

JAENO

★ Post la marŝo en Almerion de Jordi Lietor pro laboraj kialoj, la movado iom stagnas en Jaeno. Tamen restas tie samideanoj kiujn oni povas kontakti pere de la fejsbuka paĝo “Idioma Esperanto en Jaen y Alrededores”.

GRANADO

★ De tempo al tempo la granada esperantistaro renkontiĝas ĉe la kafejo “La Goma”, str. Gracia 40. Pliajn informojn oni povas trovi sur la fejsbuka paĝo “Esperanto en Granada”.

SAN FERNANDO (Kadizo)

★ Dank'al la streboj de nia samideano Francisco Javier Guerra Sabio, la Asocio de Lernantoj de la Oficiala Lingvo-Lernejo en San Fernando (Kadizo) organizis kurson de la internacia lingvo en tiu oficiala instru-centro.

JOSÉ GARZÓN RUIZ:¹ UN ILUSTRE ILUSTRADO

Cuando murió mi abuelo, en 1955, yo tenía ocho años, por lo que mis recuerdos concretos son confusos. O mejor, están modificados por las cosas que posteriormente, me contaba mi madre, su hija.

Teníamos una casa de la que salí a los 12 años; una casa que recordaba inmensa, hasta que volví a visitarla hace pocos años. Es verdad que era muy grande, pero yo la había magnificado. En ella vivíamos juntos varios miembros de la familia. En la planta superior, mis abuelos maternos, una tía casada, su marido, y un tío soltero que, curiosamente, habían bautizado como Francisco de Asís Esperanto. Indudablemente, su padre, mi abuelo, D. José Garzón Ruiz, le tenía un gran cariño y respeto a esta lengua universal, cuyo sueño compartió con el Dr. Zamenhof. En la planta baja, vivían mis padres y sus cuatro hijos, Yo soy el menor de éstos, y el menor de todos los descendientes de mi abuelo. Me llamo José María, por él.

Quería un nieto con su nombre. Ningún hijo se llamó José. Me pregunto por qué, pero creo recordar que uno, de ese nombre, murió niño. Cuando nació mi hermano mayor, le pusieron Pelayo por mi abuelo paterno, y José por él: Pelayo José. Luego nació una hermana, que se llamó a Elvira, como mi abuela, su esposa. Luego nació otra chica, y pensando que no iba a tener un nieto con su nombre, le pusieron María

¹ Kutime en nia revuo ni ĉiam uzas la zamenhofan lingvon, do sur ĝi ne ofte aperas artikoloj en la hispana lingvo. Tamen, jen ekcepto, elstarinda ekcepto. Kiel Vi scias, nia revuo atingas hodiaŭ sian 100-an numeron, cent numeroj en sia dua epoko, ĉar la revuo jam estis eldonita komence de la pasinta jarcento de Sinjoro José Garzón Ruiz, la fondinto de nia revuo en la jaro 1909. Hodiaŭ lia nepo, José María Sánchez Garzón, oferis sin por kunlabori pere de ĉi tiu kontribuo. Temas pri artikolo kiu memoras la fondinton de nia revuo. Jam skribis Zamenhof...*viaj nepoj vin benos*. Dankojn, José María, pro Via elstara kontribuo. Ni daŭre laboros dum multaj pliaj numeroj cele la saman revon de Via avo.

José. ¡Y por fin, vine yo al mundo! Mi abuelo se empeñó en que me llamara cómo él. Y aquí estoy, *José María*. Curiosamente, yo nací un 5 de abril; él, el seis de abril de 1871.



Era un hombre admirable y admirado. Su huella quedó marcada en la ciudad de San Fernando (Cádiz), la Real Isla de León, en donde se iniciaron las Cortes de Cádiz, nuestra ciudad natal, en la que tiene dedicada una calle, y en donde nacieron también sus hijas, las revistas esperantistas *Gazeto Andalusia* y *Gazeto Hispana*. Falleció allí mismo el 7 de marzo de 1955, un mes antes de cumplir los 84 años de edad.

Para todos nosotros, su familia y conocidos, es un modelo de hombre cultísimo, multifacético... lo que podría llamarse *un ilustrado*. Lo recuerdo siempre en su despacho, con su cuidadísima barba blanca, que un barbero recortaba casi diariamente, y un batín corto, muy elegante. La puerta de su despacho era una vidriera, a la que me asomaba, y veía admirado una estatua, de tamaño natural, de Dafnis y Cloe. Cuando pasaba, él colocaba una moneda en su bolsillo, para que yo la cogiera.

Obtuvo la Licenciatura en Derecho por la Universidad de Sevilla, y, como en casi todo, destacó como jurista. Escribió un Índice Legislativo Español, que fue usado como manual de estudiantes. Ejerció varios cargos públicos, como Juez; Alcalde de San Fernando (octubre de 1923 a mayo de 1925); Presidente Local de Cruz Roja Española (1918/1919) creando un dispensario que atendía gratuitamente a personas sin recursos económicos.

Otra de sus grandes pasiones eran las palomas mensajeras, de las que se ocupaba personalmente, y mantenía “correspondencia” (muchas en esperanto) a través de ellas. Fue también, por esa ilusión, Presidente de la Real Sociedad Colombófila de San Fernando. Cuando no era, como ahora, muy común, él se preocupaba por la conservación de la naturaleza. Entre otras muchas actividades, instituyó la “Fiesta del Árbol”, en que se favorecía plantarlos, para cuya iniciativa cedió su finca llamada el Jardínillo.

Es considerado también fundador de los Exploradores de España, antecedente de los Boys Scouts. A ellos consagró mucho tiempo, compartiendo acampadas. Aún mayor, siguió colaborando y haciéndose presente en sus actividades y en una de sus fincas ya citada, “El Jardínillo”, estableció un campamento permanente. En los Exploradores ocupó diversos puestos como Secretario del Consejo Local, Instructor Honorario, Instructor, Presidente del Consejo local, Delegado Provincial de la Institución de los Exploradores de España.

La Asociación de Los Exploradores de España, reconoció a José Garzón Ruiz su trabajo con diversas distinciones: Cruz Suástica de oro, Medalla de la Constancia de Oro, con dos pasadores, Medalla de Oro al Mérito escultista, la medalla de Oro a la Constancia, con tres pasadores. Y el Lobo de Bronce.

En 1907 ingresó en la *Hispania Societo de Esperanto*. Ya he citado la creación de las dos revistas, con tirada nacional y regional, pero debemos detenernos un poco en su pasión por el Esperanto. Creyó y luchó por su universalidad como lengua, vehículo de comunicación,

diríamos “neutra”, entre todos los pueblos. La utilizó y la fomentó, siendo autor de diversas publicaciones como el *Prontuario de Esperanto* y la *Gramática completa*, que fue recomendada por el propio Dr. Zamenhof, creador de dicha lengua universal.



Recuerdo, como en un sueño, que teniendo yo unos siete años, unos extranjeros, creo que suizos, vinieron a nuestro pueblo natal para conocer a mi abuelo. Me sorprendía oírlos hablar fluidamente en una lengua para mí desconocida, en la que se comunicaban como si fuera la natural de mi abuelo.

Esta vocación esperantista le dio muchos amigos en el mundo entero, con los que se comunicaba

lógicamente en esperanto. Era tanta su ilusión que, como indiqué más arriba, llegó a bautizar a uno de sus hijos con el sobrenombre de “Esperanto”: *Francisco de Asís Esperanto*.

Tuvo presencia viva en muchas instituciones locales y provinciales, por las que fue condecorado, y cuyas medallas conservo: Comendador del Mérito Agrícola, Gran Cruz del Mérito Civil, Cruz del Mérito Naval con distintivo blanco, y un largo etcétera.

Cabe destacar también su afición a la pintura. Una prima mía conserva una Inmaculada, copia de Murillo, que pintó y estuvo sobre su cama hasta su muerte. Y, la verdad, es que fue bueno, pero tuvo otras pasiones, como el esperanto, que lo absorbieron mucho más. También

fue muy amigo del pintor gaditano Godoy, premio nacional de pintura, que en 1925 le hizo un maravilloso retrato que yo conservo.

Fue un hombre decidido y valiente, y por su personalidad distinguida llegó a tener problemas graves con el régimen franquista, ya que, aunque aceptó el golpe de Estado, reclamaba el regreso del Rey, o de su hijo, D. Juan de Borbón. Además, cuando la República aprobó el divorcio, él, siendo juez, había reconocido varios, lo que le produjo que al menos tuvieran sospechas de su no vinculación al franquismo. Era un monárquico convencido.

En esa misma línea, durante la República, tampoco retiró de su despacho una enorme bandera del Somatén que recuerdo, en una vitrina enorme. (A lo mejor no lo era tanto). Era amigo personal del jerezano D. Miguel Primo de Rivera. También tuvo conflictos políticos porque mi madre, al salir de un funeral por José Antonio, hijo de aquél, y fundador de La Falange, se negó a hacer el saludo fascista, brazo en alto. Ambos tuvieron que sortear bastantes obstáculos, aparte de pagar una multa, que conservo, de 100 ptas., cantidad muy alta en la época. Era, pues, una familia monárquica, cuando había pocos monárquicos. Tanto él como mis padres eran Requetés, pero al acabarse la dinastía, admitieron su fusión en la persona de D. Juan de Borbón, Conde de Barcelona.

Éste era mi abuelo, un hombre inquieto. Lo recuerdo con admiración. No puedo decir ese tópico de “me siento orgulloso”, porque considero que, aunque inmodestia, uno sólo debe sentirse orgulloso de los propios logros frutos del esfuerzo personal. Pero, eso sí, creo que es un modelo de hombre polifacético e íntegro.

José María Sánchez Garzón

18-a Andaluzia Kongreso de Esperanto

Arundo (Malago) de la 1-a ĝis la 4-a majo 2014.

Kiel dirite, ĉi tiu numero de *Gazeto Andaluzia* deziras dediĉi kelkajn paĝojn al tiuj elstaraj eventoj okazintaj en Andaluzio ekde antaŭ du jaroj, ĉar tiu estas la tempo ekde kiam ne aperas la revuo. Kompreneble paroli nun pri la Andaluzia Kongreso de Esperanto de la jaro 2014 povas ŝajne ekster-tempa afero, krome estas facile trovi informojn pri tiu kongreso sur multaj aliaj revuoj. Do, ni aperigos ĉi tie nur fotografiaĵojn de tiu evento, kiu ĝis nun estis la plej amasa kaj sukcesa esperantista kongreso okazinta en Andaluzio.



Juan Diego Díaz Bautista, unu el la ĉefaj organizantoj de la Kongreso bonvenigas la gekongresanojn. Sur la prezida tablo, inter aliuloj, la urbestro de la urbo kaj la prezidanto de HEF.

La monaĥejo Santo Domingo, la belega kongresejo en Arundo, tuj apud la fama Nova Ponto, kie okazis la kongreso.





Ni ne forgesu, ke la flamenka arto estis unu el la ĉefaj temoj de la Kongreso.



Kaj sendube unu el la plej memorindaj momentoj de la Kongreso, María Villalón, kantas en esperanto sian plej konatan kanzonon “La Pluvo”. Serĉu ĝin en jutubo.

La muziko ĉefrolis dum la Andaluzia Kongreso.

Jen koncerto de la andalusa ensemblo *Turat Al-Andalus*.





Inter la 150 partoprenantoj troviĝis granda nombro da eksterlandanoj.




Miguel Fernández prezentis sian libron “Poezio, armilo ŝargita per futuro”.






Oficiala foto de la partoprenantoj en la Kongreso



**20-a Andaluzia Kongreso
de Esperanto**

Esperanto kaj Naturo / Ĉielo kaj Tero



De la 29a de oktobro ĝis la 1a de novembro de 2016
Antequera (Hispanio)



**20a Andaluzia Kongreso de
ESPERANTO**

Antekero, 29a oktobro / 1a novembro 2016

19-a Andaluza Kongreso de Esperanto

Jerezo (Kadizo) de la 30-a oktobro ĝis la 1-a novembro 2015



La sukceso de la Andaluza Kongreso de Esperanto okazinta en la jaro 2014 ŝuldiĝis sendube al la fakto, ke ni kunorganizis samtempe, sama loko – sama dato, la tiujaran Hispanan Kongreson de Esperanto. Do, la defio de la andaluza esperantistaro estis organizi unu jaron poste, en 2015, Andaluzian Kongreson de Esperanto kaj nur tiun eventon. Kompreneble ni eĉ ne revis pri la ĉesto de preskaŭ ducento el homoj alvenintaj en Arundon, tamen la ĉesto de preskaŭ 70 gesamideanoj en Jerezo ja estis sukceso.

La organizantoj pripensis sufiĉajn kaj interesajn programerojn, tiel, ni komencis eĉ antaŭ la oficiala malfermo de la Kongreso. Vendrede matene ni organizis viziton al la Reĝa Observatorio de la Hispana Mar-Armeo en la urbo San Fernando, kie ni ricevis klarigojn pri astronomio, stel-observado, mezurado de teraj kaj ĉielaj distancoj ktp. Ni eĉ konis tiam, ke la oficialan hispanan horon oni kalkulis ĉe tiu Centro. Poste ni organizis turisman viziton al la urbo Kadizo, la plej antikva en la Ibera Duoninsulo kun pli ol 3.000 jaroj da historio. Ni ricevis la klarigojn de Francisco Javier Guerra, samideano de San Fernando, kaj nia asocio eldonis turisman broŝuron pri la urbo en Esperanto.



Broŝuro eldonita en esperanto de nia Asocio, okaze de la vizito al la Observatorio en San Fernando

Jam sabate matene malfermiĝis la Kongreso kun la ĉeesto de la Kultura Skabeno de la Jereza Urbodomo, kaj okazis jam la unuaj prelegoj. Ĉi-jare la organizantoj deziris levi la lingvan nivelon de la programoj, kaj se eble paroligi la gepartoprenantojn en la internacia lingvo. Ni pensas, ke iamaniere ni tion atingis. Elstarindas la ĉeesto de Duncan Charters brita-usona samideano, universitata profesoro, kiu parolis al ni pri la organizado de kursoj de esperanto en la Universitato, ĉar jen la ĉeftemo de la andaluzia kongreso de esperanto: la internacia lingvo kaj la Universitatoj. Duncan parolis al ni en kvieta, belsona kaj perfekta lingvo kaj kiel diris al mi unu el la novaj partoprenantoj.... *nekredeble! Mi komprenis ĉion kion li diris.*

Alia belega programero de la Kongreso estis la inaŭguro de strato dediĉita al jereza esperantisto S-ro Pedro Naranjo Terán (1887-1968). Ni iamaniere deziris omaĝi al tiuj izolitaj esperantistoj kiuj neniam ĉesis propagandi kaj disvastigi nian lingvon, eĉ kiam la etoso, tiu post-milita Hispanio, ne estis tre favora al nia idealo. Okazis tiu inaŭguro kun ĉeesto de la skabeno de la Urbodomo kaj jen nova ZEO (Zamenhofa kaj Esperanto Objekto) en la mondo. Kiel kuriozaĵo mi devas diri, ke dum tiuj tagoj ni serĉis kaj serĉadis eblan idaron de nia jereza samideano, tamen ni ne sukcesis, sed hazarde, kelkaj semajnoj post la inaŭguro de la strato ni ricevis leteron de unu el la nepinoj de S-ro Naranjo Terán, dirante, ke ŝi eltrovis la novan straton kaj por ŝi estis mirinda surprizo.



Partoprenantoj en la 19-a Andaluzia Kongreso de Esperanto
Jerezo, oktobro 2015

Dum-vespere pliaj prelegoj okazis, D-ino Rafaela Urueña parolis pri la jurisdikciaj problemoj inter la brita kolonio Ĝibraltaro kaj Hispanio en la mediterranea maro. Alie, Alejandro, universitata profesoro en la Universitato La Laguna Kanaria Insularo, parolis pri sia sperto en la organizado de kursoj de esperanto kun oficiala akademia valoro en tiu Universitato. Kiel dirite kelkaj programeroj pritraktis la temon Esperanto kaj Universitato, ĉar la celo de nia asocio en Andaluzio estas atingi la akademian agnoskon fare de la universitataj aŭtoritatoj de la diplomo pri kono de la internacia lingvo, do oni prezentis ankaŭ dum la Kongreso la demarŝojn tiu-sence plenumitaj de nia andaluzia asocio, kiu jam prezentis oficialan peton en la Universitato de Kordovo kaj baldaŭ faros same en Malago kaj poste en Seviljo, Granada....

Krom seriozaj prelegoj ankaŭ okazis lingvaj ludoj. Nia samideanino Fatima Jimenez gvidis atelieron pri mikrofikciaĵoj, kiu finiĝis post du sesioj en gaja kaj agrabla konkurso kiu celis krei mikrofikciaĵojn, multaj ĉeestantoj partoprenis kaj eĉ oni disdonis premion: ŝerea vina botelo.



Strato “Esperantista Pedro Naranjo Terán”
inaŭgurita en Jerezo okaze de la Andaluza
Kongreso

Ha, Jerezo la ĉefurbo en Hispanio de arabaj ĉevaloj kaj bongusta vino. La ĉeestantoj vizitis dimanĉe matene vin-kelon en Jerezo, kie ni ricevis klarigojn pri la maniero ellabori la mondfaman vinon, kaj eĉ gustumis ĝin. Same, ni vizitis la ĉeval-tavolojn de tiu vinkelo kie ni povis vidi ĉevalojn kaj ĉaretojn.



Vin-kelo de la entrepreno “Real Tesoro”, kie la geesperantistoj ricevis klarigojn pri la maniero ellabori la vinon.... kaj gustumis ĝin.

Resume, bonega renkontiĝo, bona lingva nivelo, vizitindaj lokoj kaj kiel ĉiam tre ĉarma etoso. Multegajn dankojn al la organizantoj, ĉefe al Fco, Javier Guerras, esperantisto de la apuda urbo San Fernando kaj al la malaganoj Angel, Marilo kaj Carlos, kiu vojaĝis tiom da fojoj por pritrakti la organizadon de la kongreso kun la municipaj aŭtoritatoj. Kaj kompreneble finajn dankojn al ĉiuj ĉeestantoj kiuj akceptis nian inviton veni en Jerezon por vidi la urbon, koni la ĉirkaŭaĵojn kaj paroli esperanton.



Profesoro Duncan CHARTERS





La skabeno pri Kulturo de la Jereza Urbodomo kaj la Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo inaŭguras la straton



La Jereza Alkazar:
belega kaj historia
kongresejo



Lingva Angulo

Komenci / Komenciĝi

Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro* la signifo de la verbo “komenci” estas: *fari la unuan parton de afero aŭ de ago. Transiri en novan staton.*

Unue ni devas scii, ke la verbo *komenci* estas transitiva, tio estas, post ĉi tiu verbo estas necese aperigi rektan objekton, tio kio estas komencota, sub akuzativa formo (-n). Do, ĉiam oni komencas “ion”. Ni vidu ekzemplon:

- La direktoro komencis la paroladon per belaj vortoj dediĉitaj al omaĝinto.
(El director comenzó el discurso con unas bellas palabras dedicadas al homenajeado).

Kiel dirite, ĉiam estas necese komenci “ion”. En la pasinta frazo, la direktoro komencis *paroladon*. Tiel la rekta objekto, tio kio estas komencota, aperas sub akuzativa formo.

Sed nun, ni vidu jenan frazon en la hispana lingvo:

- *El año empezó con una gran nevada.*

Ĉu la taŭga traduko estus jena? “*la jaro komencis per granda neĝado?*” Ĉu mankus io en la frazo? Ĉu ne estas necese komenci “ion”? Jes, ni memoru, ke la verbo *komenci* estas transitiva. En la proponita frazo la jaro komencis... sed, kion la jaro komencis?

Nu, se tio kio komenciĝas estas la subjekto mem, do ne ekzistas rekta objekto, ni uzu la finaĵon *IGĜ*. Tiel, ni diru: “*La jaro komenciĝis per granda neĝado*”. Laŭvorta traduko en la hispanan estus: “*el año se*

empezó con una gran nevada”, tamen estas pli lerte diri: “*el año empezó con una gran nevada*”.

Resume, la verbo *komenci* postulas rektan objekton, tamen, se tio kio komenciĝas estas la subjekto mem, ni uzu la formon *komenciĝi*. Ni vidu kelkajn ekzemplojn:

- La kurso komenciĝis hieraŭ.
- La profesoro komencos morgaŭ la kvinan lecionon.
- La pluvado komenciĝis abrupte.
- La panistoj komencas sian laboron je la 12-a horo.
- La milito komenciĝis per perfida atako al civiluloj.

Kelkaj kromaj klarigoj:

- Ni povas uzi infinitivon post la verbo *komenci*
Mia filo komencis studi

Ĉi-kaze, la infinitivo ĉiam povas esti anstataŭigita de substantivo kun la sufikso –AD.

Mia filo komencis studadon.

- Alie, ne temas pri rekta objekto, kiam post la verbo “*komenciĝi* ni trovas vortojn rilatajn al tempo en akuzativo. Ekzemple:

La kurso komenciĝis la pasintan semajnon.

Do, ne forgesu:

Se Vi deziras uzi la verbon KOMENCI, estas necese komenci ION. Tamen, se tio kio komenciĝas estas la subjekto, ne uzu komenci, sed KOMENCIĜI.

Turismi en ... Villanueva de Córdoba (Kordovo)

Ĉe la plej norda regiono de Andaluzio, tuj apud Ekstremaĉuro kaj La Manĉo, ĉe valo nomita *Pedroches*, troviĝas bela andaluzia vilaĝo: Villanueva de Córdoba.

Kelkaj prahistoriaj monumenotj, kiel la dolmeno de *Aguilillas*, pravas, ke en tiu zono jam loĝis homoj de antaŭ miloj da jaroj. Ekzistas ankaŭ tombejoj en la zono, kaj ene de ili troviĝis kolieroj, ter-potoj kaj hakiloj. Laŭ historiaj eseoj, proksime al la nuntempa Villanueva, la romianoj fondis la urbon *Solia*. La graveco de ĉi tiu urbo baziĝis sur la fakto, ke tra ĝi pasis la vojo inter la centra parto de la Ibera Duoninsulo kaj la romia urbo *Iliturgis*, la nuntempa *Andujar*. La romianoj ekspulatis plumbajn kaj kuprajn minejojn.

La visigotoj nomis ĉi tiun zonon *Ilpericus* kaj kiam la araboj venis en la Iberan Duoninsulon, ĉi tiu punkto estis tre grava, ĉar troviĝis mez-distance inter Toledo kaj Kordovo. La kastilia reĝo Alfonso la 7-a konkeris la tutan valon *Pedroches*, kvankam la alveno de kristanoj estis jam definitiva post 1212 dank'al la batalo en *Navas de Tolosa*.

Laŭ tradiciaj rakontoj Villanueva de Córdoba fondiĝis en la 14-a jarcento, kiam enloĝantoj de diversaj vilaĝoj de la valo *Pedroches* renkontiĝis ĉi tie post fuĝo pro pesta epidemio kiu izoligis aliajn zonojn. La unua nomo de la vilaĝo estis Villanueva de la Jara kiu en la



Blazono de
Villanueva de Córdoba

jaro 1553 ricevis honoran titolon de la reĝo Karolo la 1-a, pro tio la blazono de la urbo estas tute simila al tiu de la imperiestro.

En la jaro 1724 la valo *Pedroches* dividiĝis laŭ sep vilaĝoj, unu el ili estis Villanueva de Córdoba. Dum la 19-a jarcento la vilaĝo estis tute dediĉita al la brutar-bredado, ĉefe porkoj. Jam en la 20-a jarcento kaj dum la civila milito, en Villanueva de Córdoba restis la provincaj aŭtoritataj de la Hispana Respubliko, ĉi tie ankaŭ troviĝis la militestroj de la respublika armeo kiu luktis en la provinco, pro tio la urbo suferis oftajn bombardadojn de la frankisma aer-armeo.

Hodiaŭ, Villanueva de Córdoba estas vizitinda urbo kun belegaj pejzaĝoj, kie regas la verdaj kverkoj kaj la porkoj, la ĉefa ekonomia rimedo de la tuta valo. La konstruo de moderna stacidomo, kie haltiĝas la rapida trajno inter Madrido kaj Andaluzio, sendube faciligas la vizitadon al la urbo.

Monumentoj



- Antikva Juĝejo:

Starigita dum la 17-a jarcento, temas pri tipa konstruaĵo el granito, kiu unue estis juĝejo, poste lernejo, hospitalo, urbodomo kaj nuntempe estas la loka muzeo.

- Preĝejo Sankta Mikaelo:

Temas pri la unua preĝejo en la urbo kaj nuntempe la plej grava, elstarindas la turo kaj la sonorilaro. Bedaŭrinde dum la civila milito la altaroj troviĝantaj ene de la preĝejo estis tute detruataj.

- Preĝejo de la Virgulino de la Luno:

Starigita en la kamparo, meze de la urboj Villanueva kaj Pozoblanco, ĝi apartenas al ambaŭ vilaĝoj. Kiel tiuj aliaj preĝejoj, la interna parto estis tute detruata dum la milito.

- Kontraŭ-avia ŝirmejo:

Villanueva de Córdoba estis la plej grava vilaĝo en Kordovo regita de la respublikana registaro dum la civila milito. Do, la respublikaj aŭtoritatoj kaj la militestroj restis ĉi tie dum la tuta milito kaj pro tio, la urbo estis celo de la aviadilaj bombardadoj. Pro tio, oni konstruis subteran kontraŭ-avian ŝirmejon. Ĝi troviĝas ĝuste en la plej centra placo apud la urbodomo kaj antaŭ kelkaj jaroj oni decidis rekonstrui la lokon por ebligi turismajn vizitojn.



Kontraŭ-avia ŝirmejo en Villanueva de Córdoba, konstruita dum la civila milito

Gastronomio

Villanueva de Córdoba kaj la tuta Valo *Pedroches* estas mondfama pro la porkoj kaj la porkaĵo. La produktado de salita ŝinko estas la plej grava ekonomia rimedo de la tuta zono. Ĉiujare okazas la festo de la ŝinko, tiam oni povas gustumi la plej bongustajn kaj altkvalitajn porkaĵojn de la Valo *Pedroches*. Ankaŭ ests bongustaj la montara buljono kaj la *jarota* salmoreho. *Jarote* (prononcu “harote”) estas la patro-nomo de la enloĝantoj de Villanueva de Córdoba.

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

70 jaroj da tri kordovaj herooj

En la monato marto 1937 la revuo *POPOLA FRONTO*, eldonita en Valencio de esperantistoj apogantaj la Hispanan Respublikon, diskonigis jenan informon; en la urbo Kordovo la faŝistoj mortpafigis la tutan esperantistaron de la urbo. Laŭ komento de la revuo, Esperanto tiam havis siajn unuajn martirojn ĉar la internacia lingvo en Hispanio jam estis morto-risko. La revuo mem informis ankaŭ, ke tiun novaĵon oni aŭskultis en faŝisma radio, kiu elsendis la informon pri la mortpafo en Kordovo de ĉiuj masonistoj kaj esperantistoj, *pro ilia agado kontraŭ la Nacio*.

En la jaro 1968 la esperantista historiisto André CAUBEL pristudis ĉi tiujn okazintaĵojn. Li eltrovis leteron de nederlanda katolika esperantisto, certe simpatianto al naciisma armeo en Hispanio dum la civila milito, kiu demandis perletere al la centra kazino de Franko, ĉu tiu informo estis vera aŭ ne. La respondo de la naciismaj militistoj neis la verecon de la informo.

Certe, en la urbo Kordovo oni ne mortpafigis esperantistojn por la ununura fakto esti parolantoj kaj disvastigantoj de la internacia lingvo, sed tucerte kelkaj elstaraj esperanto-movadanoj mortis dum la milito en Kordovo, pafitaj de naciisma soldatoj. Ili estis la kordovaj herooj kaj tio okazis ĝuste antaŭ 70 jaroj.

★ **ROGELIO LUQUE DÍAZ** (1897 – 1936)

Ni jam parolis sur alia numero pri ĉi tiu elstara kordova esperantisto. Li naskiĝis en la vilaĝo *Priego de Córdoba* kaj en la jaro 1919 li

kunfondis libro-vendejon en Kordovo. Li lernis la internacian lingvon kaj li faris el sia vendejo la kernon

de la movado en Kordovo. Tie, li diskonigis la lingvon, eldonis propagandan materialon, enmetis esperantigitajn tekstojn en urbaj gvidlibroj eldonitaj de li mem, ktp. Li estis sekretario de la Andaluza Esperanto-Federacio kaj delegito en Kordovo de Universala Esperanto-Asocio. Li kunorganizis Iberian Kongreson de Esperanto en Kordovo en la jaro 1925 kaj ĉeestis kelkajn internaciajn renkontiĝojn en Eŭropo dum tiuj jaroj.



Rogelio Luque Díaz

En aŭgusto 1936 li vizitis la familion de mortpafito, cele montris kondolencon, kaj tiumomente li estis arestata sub la akuzo diskonigi marksismajn, naturismajn kaj masonistajn verkojn en sia libro-vendejo. La 16an de aŭgusto 1936 li mortis pafita. La vivdino daŭrigis la negocon post la milito kaj ankoraŭ nuntempe la librovendejo *Luque* estas la plej grava en la urbo Kordovo.

★ **MANUEL RUÍZ MAYA** (1888 – 1936)

D-ro Ruiz Maya estis la tiutempa plej elstara kuracisto en Kordovo. Licenciita en la jaro 1910 en la Universitato de Granado, li eklaboris kiel kuracisto en la Mineja Kompanio de *Cerro Muriano* (Kordovo). Tie, li konis la terurajn vivajn kaj labor-kondiĉojn de la ministoj. Li demisiis kaj daŭrigis doktorigajn studojn en la Madrida Universitato. Li studis ankaŭ Pedagogion kaj en la jaro 1919 li revenis en Kordovon por labori kiel direktoro de la Psikiatria Hospitalo, li fakis pri Neŭro-Psikiatrio kaj li atingis la plej altan prestiĝon en Hispanio kiel psikiatro.

Rilate sian politikan agadon, li estis membro de la Radikala Respublikana Socialisma Partio, kies sekcion en Kordovo li fondis.



Manuel Ruíz Maya

Ene de la partio li konis Blas Infante kaj dum la respublikaj registaroj li estis Ĝenerala Direktoro de Prizonoj kaj Provinca Registara Delegito en Almerio. Okaze de sia posteno kiel direktoro de prizonoj, li kunlaboris kun prestiĝaj juristoj kiel Victoria KENT kaj Luis JIMÉNEZ DE ASUA.

Dum siaj jun-aĝoj li lernis la internacian lingvon en Kordovo kaj li agadis dum multaj jaroj kiel sekretario de la loka grupo, kie li estis konata kiel la “juna doktoro Ruiz”.

Komence de la milito li troviĝis en Kordovo, kien li revenis post sia emeritiĝo. Li estis arestata kaj mortpafita la 16an de aŭgusto 1936.

★ **JUAN ANTONIO SERRANO OLMO** (1895 – 1936)

Esperanto-movadon fine de la 10-jardeko en Kordovo gvidis Francisco Azorín Izquierdo kaj Francisco Serrano Olmo. Francisco Serrano, kune kun sia partnero Enrique de Obregón –ankaŭ esperanto-parolanto – estis unu el la plej gravaj komerc-agentoj en la urbo, kie li reprezentis multajn kompaniojn kaj disvendis varojn, li eĉ oferis siajn servojn al la kordovaj komercistoj en la lingvo esperanto por korespondi kun eksterlandaj firmaoj.

Kune kun Francisco Serrano ankaŭ kunlaboris, en la komerca negocio kaj en la disvastigo de esperanto, lia frato Juan Antonio. Komence de la 20-a jardeko Francisco marŝis en Parizon, tie li eklaboris ankaŭ kiel komerca reprezentanto de fruktoj importitaj el Hispanio. En Kordovo restis lia frato Juan, kiu regis la komercan reprezentejon kaj

ankaŭ kunlaboris en la disvastigo de la internacia lingvo. Li kunorganizis la Iberian Kongreson, okazinta en Kordovo en la jaro 1925, kaj li agadis ne nur en la movado en Kordovo, sed ankaŭ en Andaluzio.

Politike li apartenis al la Socialisma Partio, tie lia frato Francisco ankaŭ estis grava provinca membro. Krome, Juan Serrano Olmo ankaŭ apartenis al komercista sindikato. Komence de la civila milito en Kordovo li estis arestita kaj mortpafita la 16-an de novembro 1936.

Tri esperantistoj, tri herojoj. Ili ne mortis pro sia esperantista agado, tamen ili estis homoj enĝagitaj en siaj politikaj kaj sociaj ideoj, inter kiuj esperanto rolis gravan rolon. Ili mortis antaŭ 70 jaroj. Antaŭ kelkaj semajnoj, membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en Kordovo lasis tri ruĝajn rozojn ĉe la monumento al la mortpafitoj en Kordovo dum la civila milito, fiksitaĵ apud la nomoj de tiuj tri kordovaj herojoj.



Monumento al mortpafitoj en Kordovo dum la civila milito

FLAMENKO

La Peteneroj

La petenero estas flamenka kantaĵo kun origino ne troe klarigita. Kelkaj spertuloj pri flamenko asertas, ke ĉi tiu kantaĵo naskiĝis en Ameriko, ĉu en Meksikio, ĉu en Kubo. Aliaj opinias, ke ĝi havas judan originon, ĝuste sur la antikvaj kantaĵoj de la sefaradaj judoj de la Balkanoj. Ambaŭ teorioj prezentas favorajn kialojn kaj seriozajn dubojn. Laŭ aliaj eseistoj, ĉi tiu kantaĵo naskiĝis dum la 18-a jarcento ĉi tie, en Andaluzio, kaj la kantistino kiu unue ludis ĝin venis el la onuba vilaĝo *Paterna de la Ribera*, do jen la nomo de la kantaĵo mem

Tamen, estas necese agnoski ke Antonio Machado “Demofilo” skribis en la jaro 1881 ke, tiutempe, li trovis dudekon da peteneraj kantaĵoj kaj kelkaj el ili pritraktis amerikajn temojn:

*En Havano mi naskiĝis
Sub ombroza palmo-arbo
Tie kun ritmo petenera
Mi ricevis bapton akvon.*

Rilate la kantaĵon mem, la teksto estas ok-silaba kvar-verso, kvankam dum la kantaĵoj ofte aperas balastaj versoj kun tipaj esprimoj. Elstaraj kantistoj de peteneroj estis Antonio Chacón kaj La Niña de los Peines, kiuj surbendigis neforgeseblajn petenerojn.

*Ni ĉiam devas prizorgi
kaj la florojn kaj la amon
sen akvo floro sekiĝas,
sen kisoj l'amo foriras.*

*Tutcerte mi ne eraras,
se miaj ĝenoj eltenitaj
tiuj al vi apartenus
ja vi plorus sen-konsole
same, kiel mi ploras nun.
Ĉar mi ne trovas en ĉi mond'
rimedon por nia perdita am'.*

ALIGU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: esperanto14@ono.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe unu el la jenaj kontoj:

- Caja General de Ahorros de Granada
ES45 2031 0225 54 0100187657
- BBVA
ES81 0182 4106 71 0207160717

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2016

DANKON! Ni bezonas ĉies helpon kaj apogon.

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

ANDALUZIA KUIRARTO

Porra Antequerana (Antekera Gazpaĉo)

La gazpaĉo ne estas nur recepto, temas pri kompleta gastronomia universo. Ĉi tiu manĝaĵo, kiu havas kiel bazon tomatojn, ajlon, oliv-oleon kaj panon, havas malsimilajn versiojn tra la tuta andaluzia geografio. Ĉiu vilaĝo, ĉiu regiono en nia lando diskonigas sian propran recepton pri gazpaĉo, tiel ni povas gustumi ankaŭ *salmorejo*, *gazpachuelo*, *zoque*, *pipirrana*, *pimporrete* kaj en la urbo Antekero ankaŭ estas mondfama la *porra*.

Jen la necesaj ingredientoj:

- 500 gramoj da maturaj tomatoj.
- 1 ajlero.
- Oliv-oleo, proksimume 3 kulerroj.
- 100 gramoj da verda papriko (itala varianto).
- 300 gramoj da pan-molo.
- Kiel apudaĵojn estas eble kunmeti malmole kuiritan ovon, tunon kaj salatan ŝinkon.



*BONAN
APETITON!*

Jen la preparado:

- Ene de elektra miksililo metu la tomatojn, la ajleron kaj la paprikojn. Miksigu ĉion. Se oni deziras atingi kremozan *porra*-n, miksu ĉion dum multe da tempo kaj poste pasigu ĉion tra funela filtrilo.
- Metu la pan-molon en la tutaĵo kaj ĉio kune devas ripozigi dum 15 minutoj.
- Denove en la elektra miksililo, tre milde, miksu la kremon kaj la panon. Aldonu salón kaj oliv-oleon ĝis la atingo de kremozsa saŭco.
- Prezentu ĝin sur telero, akompanita de la ovoj, la ŝinko kaj la tuno.

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Psikofonioj en Granada

Mi ne scias ĉu la vorto *psikofonio* jam aperas ĉe esperanto-vortaroj, tamen ni ĉiuj scias pri kio ĝi temas. Psikofonio estas la registrado de tiuj sonoj kiuj havas nenian fizikan originon kaj normale ili estas uzataj en parapsikologiaj etosoj. Ĉiuj konas ekzemplojn de psikofonioj, antaŭ kelkaj jaroj eĉ televide aperis tiuj sonoj registritaj ĉe la Palacio de la Markizo de Linares en Madrid kaj, kvankam laŭ la parapsikologiistoj tiuj sonoj “apartenis al alia mondo”, verdire ili ŝajnis tre normalaj eldiraĵoj.



Antikva Deputistara
Palaco en Granada

Tamen, ne ĉiuj psikofonioj estas tiaj ĉiam. Mi memoras kiam antaŭ multaj jaroj, mi aŭdis sur la radio psikofonion registritan en la tiutempa Palacio de la Deputistaro en Granada, verdire miaj haroj hirtigis. Se temus pri laboratoriaj sonoj, ja la son-inĝeniero estus ege lerta. Sed kio okazis ĉe tiu palaco en Granada?

En 1989 oni informis pri strangaj okazintaĵoj ĉe la Palacio de la Deputistaro en Granada. Tiu konstruaĵo troviĝis en la strato Mesones, tie troviĝas nuntempe la katastra oficejo de Granada. Mezepoke, sur tiu loko, elstariĝis la preĝejo *La Magdalena*, kaj pro la Alienada Dekreto de la ministro Mendizabal dum la 19-a jarcento la preĝejo fermiĝis. Dum tiu tempo strangaj aferoj jam okazis tie. La najbaruloj aŭskultis “strangajn sonojn” kiam la preĝejo estis fermata kaj tre diskonigita estis bedaŭrinda incidente okazinta ĉe la pordo de la preĝejo, kiam ĉevaloj

de funebra ĉaro subite senbride kuris kaj provokis akcidenton kun la morto de kelkaj homoj.

Fine de la 19-a jarcento la konstruaĵo utilis kiel magazeno kaj ankaŭ tiam, la laboristoj rakontis strangajn okazintaĵojn: la varoj kaj materialoj malaperis kaj eĉ unu el la laboristoj aperis pendumita. Usona firmao aĉetis la konstruaĵon, do en la jaro 1973 oni starigis novan magazenen, kiam oni detruis muregon aperis ĉambro kun granda kvanto da homaj ostoj, eble infanoj. Pri tiu okazintaĵo nenion diris la nova proprietulo kaj la rekonstruado daŭriĝis. Pliaj teruraĵoj okazis, la faliĝo de granda tur-gruo kaŭzis la morton de junulo. Fine la magazeno malfermiĝis, sed malgraŭ la granda investo kaj la ne-ekzisto de pli granda vendejo en Granado, la proprietulo decidis fermi ĝin nur sep jaroj poste. Dum tiuj jaroj la laboristoj informis, ke la eskalatoroj funkciis sen homa interveno, la ludiloj ekfunkciis subite kaj ĉiu matene, kiam oni malfermis la vendejon, multaj varoj aperis sur aliaj lokoj.

En la jaro 1984 la Provinca Deputistaro aĉetis la konstruaĵon kaj en 1989 oni admisiis, ke tie okazis “ne-normalaj aferoj”. Denove la maŝinoj funkciis subite solaj kaj laŭ deklaris kelkaj laboristoj, kiam ili alvenis ĉiumatene ŝajnis, ke la meblaro translokiĝis dumnokte. Sed estis la noktaj gardistoj tiuj kiuj sciigis pli gravajn okazintaĵojn, laŭ ili la leviloj funkciis solaj, la klavaro de la tajpiloj sonis dumnokte kaj unu el la gardistoj eĉ preskaŭ mortis sufokita de iaspeca forto.

Pro ĉi ĉio la Provinca Deputistaro akceptis la studadon de ĉi tiuj fenomenoj. La parapsikologia grupo *Omega* esploris la lokon dum tri tagoj kaj la rezultoj estis nekredablaj. Oni konstatis la ĉeeston de ento kun ĉapelo, dum eliris fumo el la muregoj de la konstruaĵo. Sed estis psikofonio registrita dum tiu esplorado tio kio plie diskoniĝis. La sonoj estis teruraj, sciencisto mezuris la voĉ-ondon kaj deklaris, ke tiu sono ne povus eliri el homa gorĝo.

La Deputistaro forlasis la konstruaĵon, hodiaŭ tute rekonstruita situigas tie la katastra departemento.



Humuro



Jomete da vortaro



La numero 101-a de nia revuo aperos dum la monato novembro 2016.

Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Viceprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Antonio Rodríguez Gasch

Adreso: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

- * Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net
- * Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net



20-a Andaluza Kongreso de Esperanto
Esperanto kaj Naturo: Ĉielo kaj Tero

Antequera, de la 29-a de oktobro ĝis la 1-a de
novembro 2016

aeu

Andaluza Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto